

# KKPS IV – La reveno de la klaĉoj

La Klaĉ-Kunveno Post-Somera revenas al siaj radikoj! La kvara renkontiĝo, de la **28-a ĝis la 30-a de oktobro 2016**, okazos denove en Delft en la Kruithuis.




Same kiel en 2012 la renkontiĝo estos nur de NEJ kaj sen la maljunuloj de EN, kaj same kiel tiam la temo estos “Klaĉoj”. Vi havos do ankoraŭ sep monatojn por kolekti (aŭ krei) novajn klaĉojn, kaj ankoraŭ multajn ŝancojn dum printempaj kaj someraj renkontiĝoj.



Delft troviĝas meze inter la grandaj urboj de Nederlando kaj estas bone atingebla de la flughavenoj de Amsterdam, Eindhoven kaj Brussel. La renkontiĝejo troviĝas 100 metrojn for de la trajnstacio. Por tuj ekscii, kiam la aliĝilo malfermiĝas, sekvu min en Facebook ĉe

<https://www.facebook.com/klacxkunveno>



# Pos-Amiko

Printempo 2016, Numero 16

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. TEJO inspiras mondan politikon
2. Programkunordigantoj iĝas senlaboraj
2. TEJO volas trejni trejnistojn por trejnistoj
3. Batalo inter la manĝkutimoj pliakriĝas
3. FESTO 2016 nuligita
3. Horoskopoj
4. EVENTOJ

## KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

[kkps.klackunveno@gmail.com](mailto:kkps.klackunveno@gmail.com)

<http://kkps-klacxkunveno.wikiidot.com/Pos-Amiko>

[wikiidot.com/Pos-Amiko](http://kkps-klacxkunveno.wikiidot.com/Pos-Amiko)

## TEJO inspiras mondan politikon

Kreiĝis en la pola politiko nova maniero por enkonduki leĝojn. Anstataŭ la kutima enua dumtaga parolado en la parlamento, la freŝe reganta partio decidis nokte kunveni kaj voĉdoni pri novaj leĝoj, sen la ĝenado de opoziciuloj, kiuj alie plendus pri detaloj kiel konstitucio kaj bazaj homaj rajtoj.

Sed en alia organizo tia agado estas nenio nova. En TEJO ekde jardekoj regas kutimo preni ĉiujn gravajn decidojn post la noktomezo. Statutŝanĝoj, laborplanoj kaj elektado de prezidanto preskaŭ neniam okazas dum kutimaj laborhoroj. "Alie nefestemuloj povus influi nian internan politikon", avertas komitatano kun bierbotelo en la mano.



*Politikistoj nun eĉ dormas en la parlamento*

Tiel la pola politiko volas lerni de la spertoj de nia movado, kaj transprenas en Esperantujo jam konatajn solvojn. Aliaj politikaj partioj nun starigis vekservon por rapide alvenigi parlamentanojn kiam aperas dum la nokto suspektinda kvanto da leĝaj paperoj. En esperantaj renkontiĝoj ja delonge ekzistas vekservoj, kaj la nuna TEJO-prezidanto tie komencis sian karieron.

Tamen la sama komitatano rimarkas, ke Polujo ne povas transpreni ĉiujn bonajn ideojn de TEJO: “Laborplano de la Pola registaro estus tro peza por malfermi bierbotelon”.

## **Programkunordigantoj iĝas senlaboraj**

PRO, la Program-Respondecula Organizo, kunvokis krizan kunvenon por preparoli danĝeron por la tuta fako: kunordigantoj kaj kontribuantoj de la programo de Esperanto-renkontiĝoj iĝas malpli kaj malpli bezonataj, kaj multaj timas iĝi senlaboraj. La fenomeno havas diversajn kaŭzojn, inter alie la trejnadoj, kiuj okupas pli kaj pli da tempo, sed la ĉefa kialo estas la kreskanta populareco de tabloludoj inter Esperantistoj.

Profesoro doktoro E. Nuo, fama prelegisto, kiu ĉiam prezentas pri sia fako dum la Universalaj Kongresoj, plendas pri la afero: “La nova generacio, kiu devus esti la espero kaj la estonteco, ne plu aprezas la valoron de longa prelego riĉa je interesaj scioj. Ili tro multe parolas kaj tro malmulte aŭskultas.”

La alian flankon de la diskuto prezentas T. Morley, aktiva kreanto kaj tradukanto de (tablo-)ludoj en Esperanto: “Nu, la afero estas ne tiom malbona, kiel la estimata profesoro ĝin volas prezenti. Efektive dum tabloludoj la partoprenantoj pli multe uzas Esperanton kaj pli bone ekkonas unu la alian. Krome tio donas pli multajn ŝancojn por fari ŝercojn pri famaj Esperantistoj per inkluzivi ilin en la ludoj.”

Tamen programkunordigantoj ankoraŭ ne iĝas tute senlaboraj: dum la venonta IJK ankoraŭ estos programo, kaj ankaŭ dum la kvara KKPS okazos almenaŭ unu programero.

## **TEJO volas trejni trejnistojn por trejnistoj**

La Trejna Eduka Junulara Organizo dum la ĉi-jara IJF sukcese okazigas trejnadon de trejnistoj. La celo de tiu trejnado estas trejni Esperantistojn pri trejnado por ke ili tiel iĝu trejnistoj, kiuj povu trejni aliajn Esperantistojn dum diversaj trejnadoj. Sed por TEJO ankoraŭ ne sufiĉas la trejna agado. En la baldaŭ publikigota nova laborplano aperas aldona strategia celo: Trejnado de trejnistoj de trejnistoj.

La en IJF okazanta trejnado de trejnistoj estas gvidata de ne-Esperantistoj, ĉar nuntempe ne ekzistas homoj en la Esperanto-movado kun la taŭgaj kompetencoj. Por dum estontaj trejnadoj de trejnistoj eviti tian situacion, la Komisiono pri Aktivula Trejnado volas eduki Esperantistajn trejnistojn de trejnistojn, kiuj poste povos instrui al nova generacio de Esperantlingvaj trejnistoj.

Nura problemo estas, ke tiun ĉi trejnadon de trejnistoj de trejnistoj tiam gvidos ne-Esperantisto.

## Batalo inter la manĝkutimoj pliakriĝas

La ĉiamaj kapdoloroj por gastigantoj provizi taŭgajn manĝojn al ĉiuj homoj nur iĝas pli grandaj pro la apero de nova manĝstilo: la “hiperviandemuloj”. Hiperviandemulo estas homo, kiu manĝas nur viandon de tiuj bestoj, kiuj mem nur manĝis viandon. La fondinto de la movado (kaj ĉeforganizanto de la ĉiujara renkontiĝo VIANDO) V. diras, ke tio estas reago al la kresko de vegetarismo kaj veganismo.

Reage al la hiperviandemismo laborgrupo de TEVA nun intencas iĝi “bonfartveganoj”. Tio signifas, ke ili manĝas nur plantojn, kiuj havis bonan vivon kaj sufiĉan spacon por moviĝi.

## FESTO 2016 nuligita

La Breton-Franca organiza teamo decidis nuligi la renkontiĝon, pro la tro forta konkurenco de KKPS en la pasintaj kelkaj jaroj.

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Vi ebrie eniros hazarde strategian planadon de TEJO.

**Taŭro:** Vi rifuĝos al Sirio.

**Ĝemeloj:** Vi starigos servon por rete tujmendi filozofon.

**Kankro:** Vi morgaŭ maltrafos flugon al Islando.

**Leono:** Vi malkovros, ke pli gravas gusteco ol ĝusteco.

**Virgulino:** Post trejnsesio vi ne plu estos.

**Pesilo:** Forta suno blindigas vin kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Amiko mensoge deziras al vi bonan nokton.

**Kévin Morel-Fourrier:** Vi ekhavos alergion kontraŭ sablo.

**Sagitario:** Via amanto pensas, ke vi sekrete estas Hitlero.

**Kaprikorno:** Vi devos elekti inter bona matenmanĝo aŭ bona dormo.

**Akvisto:** Vi trovos unu stelon, sed ĝi bedaŭre troviĝas en la ĉielo.

**Fiŝoj:** Nuligu vian aliĝon al la universitata studo pri programkunordigado.